

Enhavo: Ne montru vian monujon al fremduloj  
Ni maljuniĝas

Vojaĝo tra Novzelando

## Ne montru vian monujon al fremduloj!

Kiel longjara vizitantino de Ĉeĥa Respubliko mi ankaŭ ĉijare denove alvenis en Ústí n. L. Ĉiam mi restadas ĉe geamikoj en apuda vilaĝo Habrovice. Kun sufiĉe multe da valizoj mi iris al bushaltejo, por tie atendi konvenan aŭtobuson. Kiam mi studis la horaron, alparolis min paro de junaj homoj. Ili demandis min, kiamaniere atingi la poliklinikon kaj mi respondis: „Legu mem, per trolejbuso 54 aŭ 56, du haltejojn!“ Intertempe alproksimiĝis alia sinjorino, kiu verŝajne nur aŭdis la vorton Habrovice kaj ŝi pensis, ke mi kiel eksterlandano bezonas helpon kaj ŝi komencis klarigi al mi, kiel veturi. Mi klopodis trankviligi ŝin: „Kara sinjorino, kvankam mi estas germanino, mi konas ĉi tie preskaŭ ĉion, ĉar mi estas de ĉi-tie, mi eĉ vizitadis ĉi-tie lernejon! Kaj mi kapablas trovi la vojon al Habrovice en dormo! Sed tiuj du, ŝajnas al mi, ne kapablas trovi la vojon al polikliniko!“ Do ŝi senkulpigis sin kaj afable adiaŭis.

Kiam mi alveninte en Habrovice forlasis aŭtobuson, kiel ununura persono, mi subite ekvidis la junan paron denove malantaŭ mi! Ĉar mi ne supozis ion malbonan, mi survoje ne ĉirkaŭrigardis kaj kontrolis la vizaĝojn. Nun la juna viro rapidis al la signo de la haltejo kaj legis, ŝajne kun surprizo Habrovice-vily! La juna virino aldonis: kaj ni volis al sanatorio Bukov! La viro ŝajnis esti tute malespera kaj petis min: „Ĉu ni povas telefoni ĉe vi, ni pagos al vi kronojn. Mi mem estas gasto kaj ĉi tie mi ne havas telefonon! Mi atentigis ilin, ke post kelkaj minutoj revenos la aŭtobuso kaj daŭrigos al la urbo, do ili veturu kaj demandu ŝoforon! „Ni ne havas biletojn, ĉu vi povas vendi al ni du biletojn? Mi demandis:

„Ĉu vi bezonas por 10 aŭ por 14 Kč? Sed ŝi diris, ke ili bezonas por 23 Kč. „Ne, tio ne ekzistas,“ mi diris al juna virino kaj fermis la monujon. En tiu momento tiu bela juna virino rapide kaptis per ambaŭ manoj mian monujon kaj klopodis perforte fortiri ĝin de mi! En tiu momento ekfunkciis iu instinkto kaj mi laŭte ekkriis! Mi mem ne kredis, ke mia malsana, malforta voĉo kapablas tiom laŭte krii. Tiu viro staris malantaŭ mi, li facile povus bati min, por ke mi perdu konscion kaj poste ili povus trankvile prirabi min.

Sed tiun akran kriadon ili certe ne kalkulis! La tuta vilaĝo povis aŭdi tion! Kvankam ni tri estis solaj sur la strato, la krio kompreneble povus altiri atenton. Nu, tion la fiuloj verŝajne ne volis riski. Subite lasis la knabino mian monujon kaj ili fulmrapide fuĝis. Tiu krio savis min! Kaj eĉ, se ili estus ŝtelintaj tiun monujon, ili



estus gajnintaj nur kelkajn ĉeĥajn kronojn kaj kelkajn busbiletojn! La monujo kun eŭroj estis bone kaŝita en alia angulo de mia valizo. Mi rapidis hejmen al mia tranoktejo kaj klopodis trankviliĝi. Mi klare vidis, ke ili nek celis al polikliniko, nek al sanatorio Bukov. Ili volis provoki min per tiuj stultaj demandoj. Ili sekvis min por esti solaj kun mi, plej eble por ke mi perdu la kontrolon pri mi. Kaj preskaŭ ili sukcesis. Sed nur preskaŭ!


Antaŭ 12 jaroj aliaj ŝtelistoj vere sukcesis. Post kiam mi tiutempe estis du horojn en Ústí, mia tuta germana mono estis for kaj valora monujo ankaŭ! Mi estis malfeliĉa kaj pensis, ke mi tuj en la sama tago devas reveni hejmen per mia rea bileto, ĉar du semajnojn eksterlande tute sen mono ne eblas. Sed tiutempe montriĝis, kiom valoras sincera internacia amikeco! Mi havis tiom da kredito inter mia amikaro, ke mi ricevis senpage tranoktadon, manĝon, partoprenkotizon de iu aranĝo ktp. Ĉion pagis miaj geamikoj dirante: „Tio ne estas via kulpo, ke vi estas sen la mono!“ Fakte ni devas honti, ke tiaj samtempuloj estas inter ni, kiuj priŝtelas gastojn!

Do karaj vizitantoj de Ústí, se iuj fremduloj alparolos vin kaj volas ion scii, eĉ se vi bone parolus ĉeĥe, prefere diru simple: "Mi ne komprenas," kaj foriru! Vi povos eviti multajn komplikaĵojn. Estu pli suspektemaj ol mi estis! La fripona duopo estas certe ankoraŭ libera, ili povus kiam ajn denove fari pluan malagrablaĵon!

*Angela Bode*

## Vojaĝo tra Novzelando

Nian aviadilan vojaĝon el Parizo al la antipoduloj ni organizis tra Singapuro. Ni atingis novzelandan Christchurch (diru: Kristĉerĉ) la 25-an de januaro 2006. La flugkompanioj zorgoplene agrabligis al ni la longdaŭran flugon. Ni estis kontentaj.



Permesu al ni iomete refreŝigi viajn lerneajn sciojn pri Novzelando. Ĝi situas je la sudokcidenta flanko de la Suda Pacifiko, 1 600 km oriente de Aŭstralio, 10 000 km malproksime de San Francisko kaj ankaŭ de Tokio. Okcidente estas la Tasmana maro kaj oriente la ondoj de Pacifika oceano. La marbordoj mezuras 18 200 km. Novzelando troviĝas en zono de oftaj tertremoj, ĉar en proksimeco renkontiĝas malsamaj tektonikaj terplatoj. Dum nia vojaĝo ni travivis 4 tertremojn, sufiĉe fortajn, tamen sen ia detruo.

Novzelando konsistas el Nordinsulo, Sudinsulo, Samoo kaj pluaj insuloj. Areo 270 700 km<sup>2</sup>, do ĝi similas al tiu de Britio aŭ Japanio. Politika sistemo: konstitucia

monarĥio; ŝtatestro: brita reĝino, ĉefurbo: Velingtono (331 mil loĝantoj); pluaj urboj: Auckland (Oklend) (953 mil); Christchurch (325 mil); administra divido: 10 provincoj. Dependaj teritorioj: Kuka-insularo, Niuo, Tokelaŭa insularo. Loĝantaro: 3,780 milionoj (en 1996), 3/4 de ili loĝas en la norda insulo. Entute estas 82% da angloj, 16% da maorioj, 2% estas diversaj. Ŝtatlingvoj: la angla kaj la maoria. Religio: protestanta.

Nederlandaj maristoj malkovris unue Tasmanion kaj samjare (1642) ili alproksimiĝis al "Sudaj Alpoj" (La plej alta „Kuka monto" atingas 3 764 m super la marnivelo). La anglo James Cook (Ĝejms Kuk) kun scienca ekspedicio en la Suda Pacifiko observis trapasadon de Venuso antaŭ Suno. En oktobro 1769 li komplete rondiris la insulojn. Botanikistoj kaj sciencistoj kolektis multe da dokumentoj. Li vojaĝis ankoraŭ dufoje al Novzelando. La lando ĉefe allogis fiŝistojn kaj lignaĵkomercistojn. Al la indiĝenaj maorioj tiaj kontaktoj malutilis. La blankuloj importis al ili pafarmilojn kaj ankaŭ morbilon kaj variolon.

En la flughaveno de Christchurch atendis nin nia korespondantino kaj amikino Erin, kiu permesis al ni uzi sian aŭtomobilon. Ŝi ankaŭ gvidis nin dum la tuta vojaĝo kaj bonege organizis nian viziton. Ni veturis pli ol 5 000 km kaj piknikis preskaŭ ĉiam ĉe marbordo. Survoje ni renkontis multajn geamikojn de Erin kaj esperantistojn el Velingtono kaj Auckland. Amikino Jo montris al ni tutan ĉefurbon. Ŝi ankaŭ gastigis nin per landa specialaĵo „Pavlova", farita el ete kuirita meringo kaj kovrita per freŝa kremo kun abrikotoj.

Erin organizis renkontiĝon kun lokaj esperantistoj kaj ni ĉiuj travivis agrablan vesperon. En Christchurch Erin prezidas la Esperantan grupon, kies anoj kunvenadas kvarfoje en la jaro, kun esceptoj, se venas alilandaj esperantistoj. La bone organizita renkonto estis ankaŭ valida momento por ĉiuj.

Pri Antarktio oni povas diri, ke ĝi estas vastega mondparto ĉirkaŭanta sudan poluson per 2,5 km dika glacitavolo. Tiu kontinento havas la saman areon kiel Eŭropo kune kun Mediteranea maro kaj estas 60-oble pli granda ol Novzelando. Ĝi estas la plej malvarma, ventega kaj seka regiono de la terglobo. Glacio kovras 96% de la tuta surfaco, blokante 70% de la monda akva rezervo. Ventegaj ŝtormatakoj atingas rapidecon de eĉ 320 km hore. Pro malmultege pluvo la kontinento estas pli seka ol Saharo. La senakvigo estas unu el la plej gravaj problemoj de scienc-espelistoj kaj iliaj akompanantoj. Oni devas trinki unu litron da akvo ĉiujn 2 ĝis 6 horojn.

Novzelanda stacio de serĉado troviĝas sur insulo Ross, 3 832 km sude de Christchurch. Laboras tie 10 personoj vintre kaj 80 somere. "La interkonsenton pri Antarktio" subskribis 47 landoj en la jaro 1997. Ĝi indikas, ke la teritorio povas esti uzata nur por scienca kaj pacema aktivaĵoj. Ĉio, kio troviĝas sub 60° de suda latitudo, estas protektata per tiu ĉi dokumento. Ĉiuj ekspluatadoj de minaĵoj kaj ankaŭ forlasado de ruboj estas malpermesataj.

La franca grupo, ekzemple, havis sciancan serĉcelon studi pingvenojn. En la jaro 1998-99 ĝi serĉis, kiamaniere la specio de la „Empereur pingveno" sin



nutras. La grupo ankaŭ studis la centron de la tera gravito, la polusan ozonan tavolon, efikojn de longdaŭra izolado al kvalito de homa dormkapablo, k.t.p.

Pri la maorioj: ili ne konis metalojn kaj multe uzadis lignon. La objektoj, faritaj por ĉiutaga vivo, socia kaj religia uzado, portis simbolajn desegnojn, inspiritajn de ilia kredo je dioj kaj je prapatraj spiritoj. Tiuj desegnoj ankaŭ ornamas komunajn domojn kaj ofte oni povas vidi valorajn artajn verkojn. Kiam venis britoj, estis malpermesite paroli la maorian lingvon en lernejoj, do infanoj komencis forgesadi ĝin, ankaŭ pro tio, ĉar eĉ gepatroj ne kontraŭstaris. Sed nun aperas sopiro revivigi la lingvon. Okazas kursoj por indiĝenoj kaj ankaŭ la televido elsendas programerojn en maoria lingvo.

Pri la nuntempo: La loĝantoj principe malakceptas socian neegalecon. Ekzemple oni fieris pro akcepto de virina voĉrajto jam en 1893. Ili kontraŭstaris al nuklea industrio kaj ĉesis partopreni en militaj akordoj kun Usono kaj Britio jam en 1986 kaj turniĝis al regionoj de Suda Pacifiko. La konfliktoj kaŭzas enmigrantaj problemoj, ĉefe la peno uzadi la teron de indiĝenoj. Tamen la socio vivas plurkulture kaj progresive.

Post la belegaj kaj riĉaj turistaj travivaĵoj ni revenis hejmen denove per aviadiloj kaj en Parizo ni surteriĝis frumatene la 24-an de februaro 2006.

*Jeannine kaj Gérard Laysemann, Francio.*

*La artikolo mallongigita de M. Šmidrkalová kaj St. Štefan.*

*La geografiajn nomojn ni modifis laŭ "La Poŝatlaso de la Mondo" (eldonita 1971).*

*Noto de la redakcio: Ni admiras kuraĝon de nia membro (ĉaretulo) vojaĝi nur kun helpo de sia oferema edzino en tiel malproksiman landon.*

## Ni maljuniĝas

Ĉu vi iam rigardis aliajn homojn en la sama aĝo kun tiu stranga sento „Eble mi ne aspektas tiom maljune?!“ Foje mi sidis en atendejo ĉe mia nova dentkuracisto kaj scivoleme trarigardis ĉion tie. Mi ekvidis tie diplomon, sur kiu estis la tuta nomo de la posedanto. Mi subite ekmemoris altan, malhelharan knabon, kiu kun mi vizitadis mezlernejon antaŭ eble 40 jaroj. Ĉu tio povus esti la sama viro, kiun mi tiam admiris?

Kiam mi ekvidis lin, rapide mi tiujn pensojn forĵetis. Tiu preskaŭ kalva, grizhara viro kun silka vizaĝo, kiu estis tro aĝa, ke li ne povus esti mia samlernanto! Aŭ ĉu tamen jes? Poste, kiam li trarigardis miajn priflegitajn dentojn, mi demandis la doktoron, ĉu li vizitadis mezlernejon de Klement Gotwald.

„Jes. Mi studis tie. Mi estis unu el la plej eminentaj lernantoj“, li ruĝiĝis. „Kaj kiam vi faris abiturientan ekzamenon?“ mi demandis. Li respondis: „En la jaro 1966. Kial vi demandas?“ — „Do vi estis en mia klaso!“ mi diris entuziasme. Li zorgeme trarigardis min. Poste li, tiu maljuna viro, demandis min. „Kaj kion vi instruis?“

Transprenita el interreto.